

La Preĝo

Wayne B. Illes (Kanado)

Jesuo instruis, ke ni ĉiam preĝu al Nia Ĉiela Patro kaj ke ni preĝu ofte (3 Nifai 18:19, 1 Tesalonikanoj 5:17). La preĝo estas unu el la plej grandaj benoj, kiujn ni havas dum nia tera vivo, ĉar per tio, ni povas havi kontakton kun Dio kaj havi Lian inspiron en nia vivo.

Kiel Sanktuloj de la Lastaj Tagoj ni kredas de ni estas gefiloj de Dio, ke li vere estas Nia Ĉiela Patro. Ni nun estas for de Lia ĉeesto, sed ĉu Li, kiel Nia Eterna Patro, ne interesiĝas pli por nia bonfarto ol nia tera patro?

Pro tio, la preĝo devus esti grava parto de nia taga vivo. Dio kompreneble interesiĝas pri nia bonfarto, pri nia vivo, kaj volas ke ni ĉiuj atingu Lian regnon.

La preĝo estas sincera peto kaj tutkora interkontaktiĝo kun Li. La Sanktaj Skriboj instruas nin ke ni nur preĝu al Dio kaj al neniuj plu. Ni ne preĝu al iu ajn alia kreitaĵo (Eliro 20:3-5).

Kial Preĝi?

La preĝo ĉiam estas grava parto de la evangelio eĉ ekde la kreo de la tero. Dia anĝelo ordonis al Adamo kaj Eva ke ili sin pentu kaj ke ili preĝu al Dio en la nomo de Lia Filo, (Mozeo 5:8) kaj oni neniam nuligis tiun ordonon. Nenio nin povas helpi pli ol simpla preĝo kaj ĉiuj niaj pensoj, eldiroj kaj agoj ricevas la influon de niaj preĝoj.

Ni ankaŭ preĝu por peti la gvidon de Dio en nia vivo, por nia familio, niaj najbaroj, geamikoj, gesamideanoj. Kompreneble ni ne nur ĉiam petu, sed ni ankaŭ dankdonu al Nia Ĉiela Patro pro la benoj, kiujn Li jam donis al ni kiel la saneco, nia familio, la evangelio, la paco, la movado, ĉio kio valoras (1 Tesalonikanoj 5:18)/

Oni ne saviĝos en la Regno de Dio post nur akcepto de Kristo en nia koro. Tio estas paŝo, same kiel la fido, pento, bapto kaj la ricevo de la donaco de la Sankta Spirito. Ni preĝu ĝis kiam ni estu en la vojo ĝis la eterna vivo. Se ni ne vivas laŭ la evangeliataj principoj kaj ne preĝas ofte, ĉu vi kredas ke ni saviĝos en la Dia Regno nur ĉar ni diris ke ni akceptas Kriston en nia koro? Tute ne.

Kiam Preĝi

Ni preĝu kiam ni sentas deziron komunikigi nin kun Nia Ĉiela Patro. Oni povas silente preĝi same kiel laŭtvoĉe. Fore ni devas esti solaj por povi koncentrigi kaj eldiri niajn plej intimajn sentojn al Dio (Mateo 6:6). Ni ankaŭ povas preĝi dum nia vojaĝo al la laborejo, al la lernejo,

kiam ni estas marŝante en la strato, en nia hejmo, ie, iam ajn.

Foje ni ne sentas nin bone, ni estas malsanaj, aŭ ni estas deprimitaj, tiam pli ol iam ajn, ni preĝu por ke Nia Ĉiela Patro nin helpu.

La Sanktaj Skriboj diras al ni ke ni preĝu sole kaj ke ni preĝu kun la familio (vidu 3 Nifai 18:21), kaj la estroj de la Eklezio ankaŭ konsilas al ni ke ni tion faru por ke nia familio ricevu benojn de Dio. Ankaŭ estas bona ideo danki al Dio, antaŭ ol ni manĝu, ĉar, ni ricevis niajn manĝaĵojn pere de Li.

En la Eklezio ni komencas kaj finas ĉiujn kunvenojn kaj Di-servojn kun preĝo.

Kiamaniere Preĝi?

Ne gravas kie ni estas, aŭ ĉu ni preĝas laŭvoĉe aŭ silente, la plej grava afero estas ke ni preĝu kun fido, kiel diras la profeto Moroni, "...kun sincera koro, kun vera intenco ..." (Moroni 10:4). Ne valoras ankaŭ eldiri ĉiam la saman preĝon. Ni diru kion nia koro sentas. Ni parolas al Nia Ĉiela Patro, do ni direktu la preĝon al Li. Ni povas dankdoni, kaj peti kion ni bezonas, montri nian amon por Li, kaj fini la preĝon en la nomo de Jesuo Kristo, ĉar Li diris ke oni preĝu al al Patro pere de Li (Mateo 6:7-8, 3 Nifai 18:19).

La Respondo al Niaj Preĝoj

Foje ni sentas la respondon tuj, fore ni devas atendi. Respondo al preĝo povas esti la inspiro agi korekte, scii kion fari dum malfacila tempo, koni la korektan respondon de ekzamena demando, kaj ĉiu persono ricevas individuan respondon.

La Sankta Spirito povas akompani nin kaj helpi kun la respondo al preĝo. Vi sentos la respondon kiam vi ĝin ricevos.

Kiam ni preĝas, ni preĝas por la estroj de la Eklezio, por la misia agado, por nia familio, k.t.p., sed ĉu ni ankaŭ preĝas por la antaŭeniro de la movado? Ĉu ni preĝas por scii kun kiuj personoj ni povas paroli pri la Evangelio kaj pri Esperanto? Se ni tion faras, Dio respondos al niaj preĝoj. Faru tion kaj vi mem vidos la rezultojn. Mi atestas tion al vi en la nomo de Jesuo Kristo.